



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »
5, Quai Vauban - 66-PERPIGNAN (P.-O.) - Telefono 34-38-84

Jara Abono : 3 F. - C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 43

2-an Kvaronjaro 1972

OFICIALA RAPORTO OKAZE DE LA KONGRESO en BALARUC-LES-BAINS (Hérault)

LA 19 an DE MARTO 1972

La kongreso estis zorge preparita de Ges-oj LENTAIGNE al kiuj iras niaj dankoj. Ĉeestas ĉirkaŭ 35 gesamideanoj el diversaj urboj de la federacio.

Je la 10a, s-ro LENTAIGNE kongres-aranĝanto, salutas kaj donas la parolvicon al la reprezentanto de la urbestro. La helpurbestro de BALARUC salutas, franclingve, kaj havas tre favorajn vortojn por Esperanto Poste, s-ro LENTAIGNE iom parolas pri la internacia Esperanto-kampadejo de BALARUC.

Ĉar, pro malsano, s-ro LLECH-WALTER, Prezidanto de la federacio ne ĉeestas, Doktorino VIERNE, el MONTPPELLIER, estas elektita por prezidi la kunvenon.

S-ro AMOUROUX el PERPIGNAN, provizora sekretario de la federacio, legas la agad-raporton de la Prezidanto. La raporto estas akceptita.

Sekvas la financa raporto de S-ro DELIGNE el NARBONNE, kasisto de la federacio. La raporto reliefigas la malkreskon de la abonoj al Sudfranca Stelo, nia federacia bulteno. Estas petate instigi ĉiujn samideanojn de la federacio aboni aŭ reaboni la gazeton. La financa raporto estas akceptita.

Je la nomo de la reprezentitaj grupoj parolas, pri la agado : por ALES : s-ro RAYNAUD ; por BEZIERS : s-ino AUTHIER, por MONTPPELLIER : D-ino VIERNE ; por NARBONNE : s-ro DELIGNE ; por NIMES : s-ino VOLPELIERE por PERPIGNAN : s-ro AMOUROUX.

Notinda estas la sukceso de s-ro DELIGNE kiu malfermis kurson en BEDARIEUX. Por kuraĝigi la novbakitajn esperantistojn, oni decidas ke la venontjara federacia kongreso okazos en BEDARIEUX.

Por revivigi la agadon de la esperantistoj en CARCASSONNE, oni proponas ke la aŭtuna kunveno de la federacia komitato tie okazu. Tamen pro la malproksimeco de NIMES kaj ALES nenio firma estas decidita.

S-ro LENTAIGNE, kun granda entuziasmo, kuraĝigas la klopodojn de ĉiuj, kiuj senlace agas por Esperanto. Longaj aplaŭdoj sekvas, ĉar li trovis la ĝustajn vortojn por kuraĝigi ĉiujn.

Estas decidite sendi salut-telegramon en Esperanto al PREZIDENTO JONAS, kiu estos oficiala gasto de nia lando, de la 21a ĝis la 24-a de marto. La telegramon oni sendos la 21an de marto, rekte ĉe la aŭstria ambasado en Parizo.

Pri esperantigo de urb-nomo "NIMES" parolas sinjorino kaj poste sinjoro VOLPELIERE.



Post duhora halto, necesa por la tagmanĝo, niaj gesamideanoj ree kunvenas por pristudi la duan parton de la tagordo. Pro la belega vetero, ankaŭ ĉar kelkaj trapasis ekzamenojn, nur 17 gesamideanoj ĉeestis. Ili pri diskutis la jenajn problemojn :

I-Propono de s-ro PEREZ por kunfandiĝo de la nun ekzistantaj federaciaj bultenoj en unu solan, kies titolo estas "CONCORDE", kaj kiu nun koncernas "PROVENCE-ALPES-COTE D'AZUR-MONACO-NICE". Ne akceptite.

Ni konservos Sudfrancan Stelon, kaj estas rekomendita pli granda uzo de la bona "Esperato-Actualités".

II - Elektado de la federacia estraro.

S-ro René LLECH-WALTER	-	PERPIGNAN	-	Prezidanto
S-ro Jean AMOUROUX	-	PERPIGNAN	-	Sekretario
S-ro Maurice DELIGNE	-	NARBONNE	-	Kasisto
S-ro Roberto FRUS	-	NIMES	-	Direktoro de la Sudfranca Stelo

III - Jarraporto de U.F.E. 1970-1971 (Franca Esperantisto, N° 270 de januaro/februaro 1972)

Rezulto de la voĉdono de nia federacio (por la nacia kongreso de NANTES)

1°) agadraporto : JES

financa raporto : SINDETENO

2°) Al la tiel prezentita demando :

"Ĉu vi konfirmas la gvidlinion de la nuna estraro kaj nome la fonduson DOMO?" ni voĉdonas : SINDETENO

Ja ne temas pri unu demando sed pri DU demandoj kiuj postulas nur UNU respondon. Ni tamen estas favoraj al la fonduso-domo sed ni energie protestas pro la misprezento de la demando kaj, sekve, nia respondo al la tiel prezentita demando estas : SENDETENO.

3°) Post voĉdono ni apogas la kandidatigon de la jenaj ok volontuloj (Konsilio de UFE)

S-ro BABIN - S-ro CNUDDE - F-ino NOURMONT - S-ro BENISTANT - S-ro GUILLAUME - D-ro TORTEL - S-ro LE MAGADURE - S-ro SEURIN.

64a franca kongreso de ESPERANTO en NANTES

ĝin partoprenos :

- S-ino VOLPELIERE - Konsilianino de U.F.E.

- D-ino VIERNE - ŝi reprezentos la federacion.

.../...

Tiu longa raporto pruvus, se bezono estus, ke ni multe laboris dum la kongreso.

La diskutoj, ĉiam en ESPERANTO, vekis la intereson de ĉiuj partoprenantoj kaj neniam lasis indiferenta ĉar ĉiu povis, libere, prezenti sian personan vidpunkton.

La kongreso finis je la 18-a.

JEAN AMOUROUX

ESPERANTISTA TAGO EN NARBONO

=====

La 17an de Majo, la Kultura Grupo "ESPERANTO" el Narbono, akceptis du bonegajn esperantistojn kiuj, vojaĝante en la suda parto de Francio trapasis nian urbon.

Ŝi, S-ino TERMANSEN, danino kun vikinga vizaĝkoloro kaj hararo ; li, S-ro HAROUN, israelano kaj perfekta mediteraneano.

Neniu el ili parolas la lingvon de la alia, sed nur esperanton. Akompanataj de G-roj DELIGNE, kaj sub bela suno, ili vizitis nian regionon. Amuza detalo : malgraŭ la varma vetero la mediteraneano frostas kaj surmetas sian mantelon, dum la nordanino brunigas sin sub la sunaj radioj. Unue ni vizitas la vilaĝeton "GRUISSAN" kies lignaj domoj estas konstruitaj sur fostaroj, kaj ni havas ŝancon vidi fiŝkaptadon "à la traîne" sur la plaĝo.

Poste ni foras longan promenadon sur la montareto "la Clappe" tra mallarĝaj vojoj, kaj niaj geamikoj rimarkas ke la regiono multe similas al la adriatika jugoslava marbordo, sed kun multe pli da arboj.

Kaj ni alvenas al "NARBONNE-PLAGE" luksa narbona plaĝo, ankoraŭ dezerta, sed ni facile imagas la somerumantan popolamason.

Finfine ni revenas Narbonon, kaj vizitas ĝiajn malnovajn stratojn, la belan mezaĝan urbodomon kaj ĝiajn muzeojn.

Je la dekokta, kunveno en la Junuldomo kie ili estas prezentataj al ambaŭ Direktoroj kaj diversaj animantoj de la grupoj, prezentado sekvitita de honorvino bone taksita de niaj gastoj, en la bona etoŝo de nia junuldomo.

Poste, okazis agrabla vespermanĝo kun la tuta esperantista grupo, vespermanĝo okaze de kiu, kiel oni diras franclingve, oni metis "Pladetojn en pladegojn" kaj por kiu la kuirestro superis sin mem.

Pli malfrue, en la granda junuldoma spektaklejo okazis prezentado de lumbildoj pri Israelo kaj Danlando. Komentoj faritaj de la prezentantoj en esperanto tuj traduktitaj franclingven, intence de la ĉeestantaro. Post la prezentado kaj ĉiam dank'al esperanto alvenas la momento de la demandoj kaj respondaj pri Israelo, Danlando kaj Francio.

Finfine alvenis disiĝa horo. Oni interŝanĝas adresojn, kaj promesas reciprokan skribadon.

La narbonaj esperantistoj gajnis du novajn geamikojn en la mondo, tiel pruvante unu plian fojon facilecon kaj utilecon de la internacia lingvo.


EKZAMENOJ.

Atesto pri Lernado: Sukcesis :

S-ro - CELIQUA, FLEITZ, DIEZ, s-ino CABANEL, f-ino BONIS

Atesto pri supera Lernado : Sukcesis :

S-roj - DELIGNE, FLEITZ, DIEZ, ABOULKER.



FINANCA RAPORTO OKAZE DE LA KONGRESO EN BALARUC

LA 19 an DE MARTO 1972

Antaŭ unu jaro mi prezentis al vi, bilancon kiu aperigis bonhavan kiu konsistis el 514,64 frankoj. Ĉu ni povas ke ni estas pli riĉaj hodiaŭ? Mi dubas. Kiel vi scias nia librotenado konsistas en tri partoj: la Kaso, la Ŝparkaso, nia Poŝta konto.



KASO

Nia kaso estas provizita de kotizoj kaj abonoj al S. F. S. de niaj narbonaj samideanoj. Mi uzas ĝin por pagi diversajn elspezojn, oficejan materialon, poŝtmarkojn k. t. p. ... En ĝi estas nuntempe 41,35 F. el kiuj estas 30,00 F. por S. E. S. Do ni povas disponi nur 11,35 F.



ŜPARKASO

Ĝia situacio ne sangiĝis kompare al pasintjara situacio. Je la sama dato, la poŝtofiĉejo jam konigis al mi la Kalkulsumojn de niaj interezoj. Nun tio ankoraŭ ne estas farita. Do, nia ŝparkaslibreto ĉiam montras havaĵon el 221,14; sed fakte ni estas iom pli riĉaj ol kio ni povas kredi.



1° — Por la kotizoj U. F. E., U. E. A., k. t. p.	1962,82
2° — Por mendo de la libretoj de S.ro ROUGETET	435,00
3° — Abono al S. F. S.	137,00
4° — Por Grésillon	5,00
	2539,82

kaj mi elspezis por:

1° — Resendo al U. F. E. de diversaj kotizoj	1605,00
2° — Mendo por libretoj de S.ro ROUGETET	435,00
3° — Poŝta konta takso	5,00
4° — Al Grésillon	5,00
	2050,00

Do ni havas en la poŝta konto: 2539,82

— 2050,00

489,82

el kiu ni devas depreni 137,00 por S. F. S. t. e. = 352,82

POŝTA KONTO

Ĉi jare oni elspezis :

Do hodiaŭ 19-an de Marto 1972, nia situacio estas la jena :

disponebla mono en Kaso	11,35
Ŝparkaso	221,14
Poŝta konto	<u>352,82</u>
Sumo	585,31
Rezervaĵo por S.F.S.	
en kaso	30,00
en poŝta konto	<u>137,00</u>
	<u>167,00</u>
TUTA HAVAĴO	<u>752,31</u>

Pasintjare, je la sama dato, post sendo de mono por S.F.S. al S-ro FRUS, ni havis 514,46

Do, ni pliricigis de 585,31 — 514,46 = 70,85

Ĉi-jare, malgraŭ kelkaj novaj membroj ni enkasigis malpli da kotizoj ol pasintjare. Tiu situacio spegulas laŭ mi, la bedaŭrindan krizon, kiun ni travivas nuntempe.

Maurice DELIGNE

MONTPELLIER

Je la komenco de januaro ni kunvenas en alia salono, ĝi estas nova kaj plaĉa. Plie, apud estas kuirejo kie ni povas prepari, kafon, teon k.t.p. Tion ni faris eĉ de la kunveno de januaro kiam ni agrable festis le reĝojn per kukaj, cidro, kafo....

Tiu salono situas je la komenco de la strato de "Faubourg Figuerolles" inter plan Cabanne kaj plan Renouvier, do proksime de la urbocentro, oportune oni povas forlasi la automobiloj apud la enirejo sur la placoj.

Okaze nia lasta kunveno oni parolis pri la unua jarcento, datreveno de la valorega poeto GRABOWSKI, kaj ni eĉ deklamis siajn poemojn.

Du gestudentoj el Kanado prezentis diapozitivojn pri sia lando. Kun granda plezuro ni babilis, kun S-ro ROUSSEAU post plurjara foresto de nia urbo. Li montris al ni diapozitivojn pri centra Afriko loko de Sia longa vojaĝo.

S-ro LENTAIGNE prelegis pri la "Jaro de la libro" kaj instigis nin aĉeti esperantajn librojn.

Dum la paska kunveno F-ino VIERNE prezentis esperantajn librojn pri turisma intereso, inter ili la plej aktualaj aperintaj : "La dolĉa Franclando, kaj la Poŝatlaso". Ŝi proponis ke dum ĉiuj kunvenoj oni prezentu esperantaj librojn laŭ temoj : poezio, filozofio, scienco, religio, arto, sporto k.t.p. tiamaniere ni pli bone konus la esperanta literaturon.

Laŭ tradicio niaj kunvenoj komenciĝas per kantoj kaj finiĝos per viglaj babiladoj.

LAST MOMENTE

Vizitis nian grupon, same kiel en NIMES, NARBONNE kaj PERPIGNAN S-ro TERMANSEN el Danio kaj S-ro HAROUN el Israelo. Yvette VIERNE

NIMES :

En Nimes, la Rondo daŭre kunvenas ĉiumonate .

Ni akceptis la 18an de Majo S-inon Esther Termansen, el Danio kaj S-ron Hanania Haroun el Israelio. Ĉi lasta montris, klarigante ilin belegajn lumbildojn pri sia lando, precipe pri la dezerto Negev. Por tiu kunveno, ni speciale petis de la Izraelida Komunumo la disponigon de ĝia salono. Tio estis akceptita kaj ni esperis, ke kelkaj personoj de tiu komunumo venos. Sed la dato tute ne taŭgis, ĉar la ĵaŭdon antaŭ Pentekosta okazas religia manifestacio kaj nur 4 aŭ 5 personoj ĉeestis nian kunvenon. Tamen ni provos profiti tiun unuan kontakton por propagandi en tiu rondo.

Alia vizito, sed tute ne atendita, : tiu de S-ro OMELSKY, Usonano kvankam lia nomo, tion ne montras.

Sukceso al ekzameno. Juna liceano S-ro André Theuillon, 17 jara, komencis lerni esperanton la 25an de januaro, malgraŭ sia preparo al abituriento. La 15an de Majo; li trapasis la ateston pri lernado kaj sukcesis kun laŭda mencio. Ekzemplo sekvida, sed ne facile sekvebla.

Propagando.

Dank'al S-ro Bizo Ito, ĝenerala Sekretario de OOMOTO, kiu vizitis nin en 1960, grava japana revuo eldonita en Ajabe aperigis artikolon pri Nimes, ilustritan per 6 fotojn, senditajn de Roger Volpelière.

La ĉefredaktoro de Midi-Libre afable refotis tiun artikolon kaj promesis aperigi ĝin en venonta numero de la ĵurnalo.

La estraro de la Turisma Ofico, tre interesita de tia propagando favora al Nimes, ankaŭ intencas paroli pri ĝi en la interna bulteno.

Tio permesis montri la taŭgecon de esperanto en internaciaj rilatoj kaj certe utilos por nia propagando en medio, kie ĝis nun, ne ĉiam ni trovis sufiĉan intereson.

Rilate tiun aferon, la Nimesa Kultura Rondo bezonas la adresojn de Turismaj Oficoj (ne francaj), kiuj eldonis faldprospekton kun esperantlingvaj klarigoj. Tiuj adresojn ĝi donos al la T.O., kiu bedaŭras, ke ĝia stoko de la komentario en esperanto ne estas sufiĉe petata. La interŝanĝo de tiuj dokumentoj povos montri al la diversaj T.O., ke ne ĉiu sola uzis esperanton en sia reklamo, kaj samtempe krei rilatojn inter urboj, kiuj ne ĵam havis okazon interrilati.

Renée VOLPELIÈRE

ESPERANTO kaj FILATELIO.

En PERPIGNAN regiona filatela ekspozicio estis aranĝata la 18, 19 kaj 20an de marto 1972 en la kadro de la tutlanda "tago de la poŝtmarko". S-ro Jean AMOUROUX, fakdelegito de U.E.A. pri Esperanto-filatelaĵoj prezentis 4 panelojn kies temo estis "ESPERANTO en POLLANDO".


Dum 3 tagoj la ekspozicio estis konstante vizitata ; ankaŭ multaj hispanoj venis.

La vizitantoj kaj ĵurio veĉdonis por elekti la plej meritplanan kolekton.

La Esperanto-Kolekto recevis la duan premion kun bronza medalo.

La regiona gazetaro plurfoje raportis kaj eĉ la interdepartamenta televido prezentis, grandplane, la fotografaĵon de D-ro ZAMENHOF kiu ornamis la centron de unu el la paneloj.

Il faut savoir que ...



LES GRANDES IDÉES PROGRESSED LENTEMENT :

- 1) Le calendrier grégorien date de 1582. Il ne fut adopté en Angleterre qu'en 1752 donc 170 ans après, en URSS qu'en 1918, donc 340 ans après.
- 2) GALILÉE osa dire en 1615, que la terre tourne. Ce qui fut enseigné par Rome seulement en 1822 : 207 ans après.
- 3) Du point de vue juridique, l'abolition de l'esclavage date de 1625; Mais ce n'est devenu réalité qu'en 1833 pour l'Angleterre; qu'en 1848, pour la France; qu'en 1865 pour les Etats Unis (donc 200-250 ans après); et il existe encore en quelques points du globe.
- 4) Les besoins d'un tribunal international ont été proclamés en 1625, sont devenus réalité en 1899, donc 274 ans après.
- 5) L'Edit de Nantes proclame la tolérance en 1598. Il faut attendre les années ..60 pour voir l'œcuménisme s'instaurer. 360 ans après !
- 6) Les Droits de l'Homme, proclamés en France en 1789; Laissons le soin au lecteur de terminer... Quant aux Droits de l'Homme proclamés par l'O.N.U.!
- 7) Le Système métrique a vu le jour en 1793; a été adopté il y a peu de temps au Japon; n'est même pas utilisé partout en France (vergées de terre, cordes de bois); sera appliqué en Angleterre en....(devinez) et aux Etats Unis en...
- 8) Les "mathématiques modernes; ont vu le jour en 1830 (Evariste Galois) et pénètrent dans les classes en 1970. Donc 140 ans après.
- 9) Le tunnel sous la Manche nous est promis pour 1980. Il y aura alors 179 ans qu'on en parle.
La liste n'est pas close (pensons au Christianisme, Socialisme, etc...)
- 10) Quant à l'ESPÉRANTO: Il a vu le jour en 1887; Il verra son adoption généralisée en l'an de grâce.... 2 087, vraisemblablement. Un peu avant peut-être, ou un peu après...

COURAGE DONC !

" La nepoj vin benos

Se vi pacience eltenos " Zamenhof (La Vojo)



PASCAL renouvelait la physique à 23 ans. LINNÉ a édifié sa classification à 25 ans. NEWTON eut l'idée de la gravitation universelle à 25 ans. GALOIS conçut son système mathématique à 20 ans... et ZAMENHOF avait 28 ans quand il fit paraître sa première brochure.

S'il est vrai que ZAMENHOF n'était pas linguiste, PASTEUR n'était pas docteur mais chimiste, etc...

Narbona Grupo



Denove la Narbona grupo

funebros

Antaŭ iom pli ol unu jaro, nia Amiko Constans mortis.

Nun, blinde, kruelege la morto ankoraŭ frapis kaj elŝiris el nia grupo, la plej bonan el ni ĉiuj, nian amikon LOUBIC.

Ĉiu scias, kia viro li estis : ĉiam afabla, helpema, tolerema.

Li dediĉis parton de sia vivo al Esperanto, kaj li instruis al mi la lingvon, sed se mi fariĝis prezidanto de la grupo, li restis ĝia animo, kaj nun li foriris.

Li elspezis maŝpareme siajn lastajn fortojn organizante kun la helpo de nia Amiko LAURENT, la kongreson de SAT - Amikaro, kiu okazis en Narbono dum Pasko, sed li ne havis eĉ la plezuron konstati la sukceson de sia laboro.

Li lasas inter ni neplenigeblan lokon, kaj por ĉiuj kiuj lin konis li restos imitinda modelo.

Maurice DELIGNE



TÉLÉGRAMME du mardi 21 Mars 1972



Destinataire : Monsieur FRANZ JONAS

Ambassade d'Autriche en France

PARIS

Texte : ESPERANTO-FEDERACIO "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

« RESPEKTOPLENE KAJ SAMIDEANE SALUTAS »

« PREZIDANTON JONAS OKAZE DE LIA »

« VIZITO EN FRANCUJO »

René LLECH-WALTER

Pardonu se restas eraroj, kulpas la tajpado. Nia afabla tajpistino ne scias Esperanton.

Ronéotipé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Dépôt Legal : Deuxième Trimestre 1972

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II, Z.U.P. - 30 - NIMES